

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburĝo
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norra, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 147
29. 7. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanon (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
ata al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abonito.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Dum la Kongreso

ET aperos ĉiutage

je la sesa horo vespere.

Ĉiu numero enhavas la raportojn pri la antaŭtagmezaj aranĝoj kaj la fakkunsidoj, detalojn pri la programo kaj ĉion sciindan.

Por efektiviĝi unikan informadon ni bezonas la helpon de ĉiuj raportantoj. Ni petas havigi al ni koncizajn raportojn. Pro teknikaj kaŭzoj estas laŭcele transdoni al ni partiajn raportojn, kiujn ni akceptos depost la 10-a h. matene.

Konforme al interkonsento kun la LKK nia redakcio partoprenos en la gazetara servo. La raportoj en ET povas esti utiligitaj por nacilingva represo en la tutmonda gazetararo.

Redakcio de ET.

Fakkunsidoj en la XV-a.

Anoncitaj ĝis 20. julio.

Juristoj:

D-ro Heinrich Orthal, Nürnberg, Fürtherstrasse 2, Elektro de la kunvena estraro. Jurscienca prelego (versajne pri la lingvo-vortara temo). Diskutado pri la raporto jurscienca. Raporto de la sekretariokasisto s-ro J. Litauer. Diskuto: Ĉu la jurista Esp. grupiĝo devas esti fako de I.S.A. aŭ ĉu ĝi devas esti sendependa asocio? Novelekto de la estraro por 1923—24. Elektro de jura terminologisto aŭ de jurista komisiono. Elektro de oficiala organo de la grupiĝo. Fiksado de la nova jarkotizo. Diskutado pri agado en 1923—24. Liberaj proponoj.

Framasonoj:

C. Barthel, Frankfurt a. Main, Wöhlerstrasse 14. Oficiala malfermo (se eble rituala); salutaroloj de la diverslandaj membroj aŭ gastoj; elekto de la estraro; raporto de la ĝenerala sekretario C. Barthel; laborprogramo; elekto de la eksterlandaj delegitoj.

Kuracistoj:

D-ro Theodor Goldenberg, Sulzbacherstrasse 4, Nürnberg. Raporto de D-ro Perl, Frankfurt a. M. novaj propraj eksperimentoj per Röntgenradioj. Vizito al la Röntgen-instituto de profesoro Wintz en la universitato Erlangen. Vizito al la tiea elektro-medicina firmo Reiniger, Gebbert, Schall A. G.

Inĝenieroj:

D-ro A. Hanauer, Charlottenburg, Kaiserin Augusta Allee 37. Speciala ofico de Esp. por la laboro de inĝenieroj; teknikaj vortaroj en Esperanto (D-ro Hanauer). Enkonduko de Esperanto en la kritikan bibliografion (D-ro Pohl). Vizito de la mondfama maŝinfabro Augsburg-Nürnberg.

Virinoj:

Signe Wollter-Pfister, Baderstrasse 17, Nürnberg. S-ino Isbrücker: la tasko de la virinoj por la paco. — S-ino Bartholomen: la specialaj taskoj de la virinoj en la komunumaj korporacioj.

Liberpensuloj kaj monistoj:

Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstrasse 50. Raporto de la provizora sekretario Hubricht. Alinomio de la Ligo. Elektro de la estraro. Kreo de la statutoj. Diversaĵoj.

Bahaistoj:

Komercokonsilisto A. Schwarz, Alexanderstrasse 3, Stuttgart. Preparaj demandoj. Parolado de s-ro Böning (Stuttgart): La bahaista movado.

Poŝtistoj:

Sup. regn. Konsilisto O. Reber, Bamberg. Raporto de la estraro kaj de diversaj land- kaj distriktoorganizoj. Disvastigo de Esperanto kaj evoluo de ILEPO inter la poŝta oficistaro. Proponoj pri regularo, jarkotizo. Novelekto de la estraro.

Pacifistoj:

D-rino Eugenie Steckelmacher, Spittlertorgraben 7, Nürnberg. Reorganizo de la Ligo. Novelekto de la komitato.

Junuloj:

(Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj):

Gerhart Habelok, Breslau, Schleiermacherstrasse 19. Raporto de la prezidanto pri la liga movado, raporto de la kasisto. Senŝargiĝo, novelekto de la estraro. Propagando, kotizo.

Fervojistoj:

Josef Blažek, vicprezidanto de I. A. E. F., Olomouc: Raporto de s-oj Blažek kaj Kubažek pri

Nürnberg kaj la Laboristaro.

Kiu de la Nürnberga Kastelo malsupren rigardas tuj al la industriema urbo kun ĝiaj sennombraj fumantaj kamentuboj, tiu tuj ekkonas kiom multe la laboristaro kontribuis al la miriga evoluiĝo de tiu ĉi mondfama grandurbo. Kune kun la kreskado de la industrio kaj de la kaŭzita per tio pliigo de la laborista loĝantaro, Nürnberg estiĝis pli kaj pli proletaria urbo. Ekkonante sian ciferan supercon kaj apogate per modela organizado la laboristaro jam frue perfortis sian parton en la urbregado kaj en la landparlamentoj. Estas ja Nürnberg la unua sudgermana urbo, kie la socialdemokratia akiris la unuan sidlokon en la regna parlamento kaj de tiam estas reprezentata plejparte per socialdemokrataj delegitoj. Al tiuj ĉi urbdelegitoj kaj anoj en la socialaj estraroj administrataj ni ja ankaŭ precipe dankas, ke Nürnberg ne postmarŝis, sed multrilate estiĝis eĉ modela komunumo al aliaj grandurboj. Sufice da gravaj socialaj aranĝoj kunhelpis anstataŭ la iamajn malbonajn kaj maldindajn vivkondiĉojn iom post iom per pli tolerablaj cirkonstancoj. Krom havigo de malkaraj laboristaj loĝejoj kaj la konstruado de propraj kooperativaj vendejoj ni citas la starigon de ejoj por senhejmuloj, de dumnoktejoj por junaj travojaĝantaj laboristoj, de gildaj akceptejoj, de varmigejoj, de popolkuirejoj, de akusiĝejoj, plue la organizadon de urba laboro-perado kaj de multaj klerigaj kursoj por laboristoj. Resume oni povas diri, ke la „Ruĝa Nürnberg“ en tiu ĉi rilato estas en la fronto.

La karakteriza klerigejo kaj la progresemo de la Nürnberga Laboristaro respeguliĝas ne laste en la fakto, ke ĝi dediĉis relative frue sian atenton ankaŭ al la Esperanto-Movado. En somero 1910 la bonkonata laborista Esperanto-propagandisto el Schlaf-Dresden eljetis la unuajn semerojn kaj tuj trovis akcepteman kampojn. En la sekvantaj jaroj D-ro Orthal (la dua vicprezidanto de la XV-a) kaj Max Hönigsberger (la financestro de la XV-a) laboris kiel bonmeritaj propagandistoj kaj kursgvidantoj. En la sama jaro okazis la fondiĝo de speciala Laborista Grupo, kiu sub la celkonscia prezido de s-o Wendl kaj dank' al la kunhelpo de s-oj Fiegl, Schulz, Krauss kaj Lebitsamer rapide ekfloris kaj havis kelkan meriton ankaŭ rilate al la ĝenerala disvastigo de Esperanto. De el Nürnberg estiĝis la najbaraj grupoj en Fürth, Zirndorf kaj Bayreuth kaj laŭ propono de la laborista grupo ekvivis ankaŭ la Nürnberg-Fürth'a Esperanto-Kartelo, en kiu hodiaŭ ankoraŭ estas kunigitaj ĉiuj kvin lokaj Esp. unuigoj. Kiam en 1912 la Ido-movado ekkomenciĝis kaj estiĝis persistajn interbatalojn, la laborist-Esperantistoj estis la decida partio kaj al ilia fida sintenado oni dankas, ke la malnova bastiono ne falis en la manojn de la kontratiuloj. La terura mondmito



La Esperanto-Laboristaro de Nürnberg.

kompreneble malpliis ankaŭ la vicojn de niaj pacaj batalantoj. Sed dank al la vigla propagando de novaj bravuloj (Pihhofer, Meyer, Lebitsamer, Gerber) la movado baldaŭ refloradis, tiel ke oni povis gvidi eĉ kursojn kun 80 partoprenantoj kaj pli. En aŭtuno 1922 okazis la landkunveno de la bavara laborist-Esperantistoj (kun 35 delegitoj el 15 urboj), kiu denove antaŭenigis la movadon. La lingvan fervoron kaj lertecon de niaj kamaradoj konvinkige pruvas la fakto, ke sufiĉe multaj bunsukcese partoprenis la oficialajn ekzamenojn. Antaŭ kelkaj semajnoj la „Verdaj komunistoj“ eĉ havigis al si specialan standardon kiu trovis antaŭ nelonge ĝeneralan atenton ĉe la tutregna laborista sportotago.

Okaze de la XV-a la Nürnberg'aj Laborist-Esperantistoj ĉiel klopodas por kiel eble multe agrablighi al siaj tutmondaj kamaradoj la restadon en la festurbo kaj havigi al ili malmultekostajn dumnoktejojn. Nia ĉefstabejo estos ĉe Valentin Suifferling, restoracio Bahaist (Heyenstr. 1). La laborkunsidoj okazos, la 5. 6. kaj 7. de aŭgusto en taŭgaj kunvenejoj; ĉiuj proponoj kaj deziresprimoj estas petataj al la Laborista Esperantista Grupo, Nürnberg, Gugelstr. 14.

Kamaradoj el ĉiuj landoj varbu diligente kaj venu grandare al nia kongreso. Jam hodiaŭ ni bonvenigas vin spirite en nia mezo!

Georg Volkert.

Takso de restado dum la XV-a.

Respondante al multaj en lasta minuto alvenintaj demandoj, la L.K.K. sciigas:

La nova decido de la bavara registaro pri takso de restado en Bavarujo (3 oraj markoj) por eksterlandanoj ne koncernas la kongresanojn. Ili nur devos pagi la impostojn publikigitajn de L. K. K. en la sesa cirkulero.

organiza laboro, diskuto pri ĝisnuna situacio de I. A. E. F. Raportoj de ĉiulandaj asesoroj kaj delegitoj. Parolado de s-o G. Habellok (Breslau) pri la terminaro. Decidoj pri fondo de fakrevuo aŭ aligo al serioza jam aperanta gazeto internacia ekz. „La Policisto“. Starigo de jarkotizo en-skriboj, abonpagoj por la fakrevuo por 1923-24. Elekto de I. A. E. F. — asesoroj kaj ev. de delegitoj por landoj, kiuj ilin ankoraŭ ne posedas. Kromaj proponoj.

Studado de naciaj lingvoj:

Johann Jungfer, Lübben N.-L., Lindenstrasse 10. Parolado de la kunvenestro: Esperanto kaj la studado de naciaj lingvoj. Diskutoj: per Esperanto al la naciaj lingvoj; poresperanta propagando inter la lernantoj de naciaj lingvoj.

Kursgvidantoj:

Emil Kreibich, Kladno, zelezarny. Enkondukaj vortoj kaj referato de s-o Emil Kreibich. Kontraŭparolado kaj referato de D-ro A. Möbusz-Lübeck. Proponoj koncerne la starigo de kursa statistiko laŭ instigo de s-o A. Degen-Leipzig. Proponoj koncerne la uzon de legolibroj en la klubaj kursoj por komencantoj laŭ instigo de s-o W. Fricke-Bremen. Proponoj kaj konsiloj pri la instruometodo en klubaj kursoj. Starigo de praktika instruopiano precipe taŭga por la klubaj kursoj. Interŝanĝo de la spertoj kaj opinioj koncerne la kursgvidadon. Proponoj kaj konsiloj pri la uzo de lernolibroj kaj elekto de la plej taŭgaj lernolibroj por la klubaj kursoj. Parolado pri la kursoj por blinduloj (Prof. Stejskal el Praha). Diversaĵoj.

Psikistoj kaj okultistoj:

Direktoro L. Gube, Berlin-Friedenau, Fregstrasse 26. Raporto pri la stato de la okultisma movado (s-o Gube). Propono rilate kuneigo de ĉiuj okultistoj-Esperantistoj. Elekto de publika organo. Raporto de s-o Gube pri kreado de tutmonda beletristika biblioteko. Esperantista okultismo.

Vegetaranoj:

Oscar Bünemann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussee 56: Raporto financa kaj ĝenerala de la sekretario-kasisto. Raporto de la landa sekretariino Noll pri la universala vegetarana kongreso en Stockholm. Opinioj, kritikoj kaj proponoj pri la oficiala bulteno „Vegetarano“ de la internacia vegetara ligo Esperantista. Diversaj demandoj, proponoj kaj deziroj.

Estraroj de naciaj societoj:

D-ro Josefo Takacs, Budapest IV, Vacu-utca 80 cm 12. — Kiel organizi la naciajn izolulojn, grupojn, societojn, federaciojn, ligojn? Rilataj raportoj de div. naciaj societoj pri organizo, stato ktp. Kiel gvidi la grupojn? Kiel plej efike propagandi?

Katolikoj:

Joh. Stahl, Nürnberg, Jakobsplatz 17. Invitataj estas ĉiuj katolikoj, la kunveno do estas ĝenerala kaj neŭtrala. Elekto de kunsida estraro. Revigligo de I. K. U. E. (R. M. Frey-Wien). Repaciĝo inter I. K. U. E. kaj I. K.

Laboristoj:

Georg Volkert, Nürnberg, Gugelstrasse 14. Elekto de la kunsida estraro. Salutaroladoj. Referato de K-do Konrad Deubler (München); La nuntempa stato de nia movado. La ekzamena regularo de Germanlanda Instituto kaj ni. Nijaj estontaj celoj (proponoj kaj diskutoj).

Sciencistoj: Vidu specialan ĉi-supran programon.

Do, ni ĝoje povas konstati, ke nia alvoko en n-o 140 de ET pri arango de fakunusidoj alportis kontentigan rezulton, tiel ke serioza datirigo plejparte estas certigita. Aliflanke por kelkaj gravaj kunsidoj bedaŭrinde ne alvenis ĝis nun detala programo. Lasthore invitante la rilatajn kunvenestrojn aŭ organizantojn, ni akcentas refoje, ke ne ricevinte programon ĝis fino de la semajno, la LKK ne povas garanti pri disponigo de konvenaj konferencoj. Nur celkonscie laborante, ni certigos la sukceson.

Por la L. K. K.
D-ro Richard Ledermann.

Sciencal kunveno en Nürnberg. Al ĉiuj!

Niaj kunvenoj estas vizitindaj por ĉiu kongresano; ĉiu estos afable akceptata! Do venu multnombre al ni, ankaŭ vi, kiuj vi ĝis nun ne estas niaj membroj! Ankaŭ vi kiel nemembroj havos parol- kaj diskutadrajton en niaj kunvenoj!

Escepto: ĉar nia (unua) laborkunsido estas konfidenca, al tiu kunveno sole estas allasataj nur pagintaj membroj de I. S. A.

Vocdonrajton en ĉiuj kunsidoj havas nur pagintaj membroj de I. S. A.; en la laborkunsidoj nur estraranoj, delegitoj kaj sekciestroj (aŭ ties oficialaj anstataŭantoj).

Ĝeneralaj kunvenoj de I. S. A.

1. Laborkunsido.

(Komparu Int. Scienca Revuo kajero 4—6, paĝo 48!)
La ĉeesto de ĉiu membro havanta oficon estas urĝe necesa!

2. Ĉefkunveno.

Raportoj (administra kaj kasa); senrespondeco de la estraro; elektoj, budĝeto, programo por la nova jaro, ktp.
Scienca prelego de Prof. D-ro Kamaryt: Pri scienca divido (prepara siŭdo pri filozofia vortaro).

Sekciaj kunvenoj.

1. T. E. K. A. Gvidanto de la kunveno: D-ro Kleider (anstataŭanto de Prof. D-ro Vanverts). Raportoj ktp.
2. I. T. A. Gvidanto de la kunveno: D-ro Stromboli. Raportoj ktp.
3. Sekcio pedagogia. Ĝenerala gvidanto: S-o Degen. Internaj aferoj, raportoj ktp.: S-o Thiel. La ĝenerala programo enhavas jenajn punktojn:

- a) Mondunuigo de edukistoj
- b) Nia ĵurnalo
- c) Infangazeto
- d) Interŝanĝado (persone, materiale)
- e) Kulturhistoriaj tabeloj
- f) Lernejo kaj gepatra domo
- g) Principoj por la instrua leĝdono
- h) Senfaka instruado
- i) Ekipigo de lerneja ŝipo ĉirkaŭ la mondo
- k) Pedagogia komisiono kiel reprezentanto dum ĉiuj internaciaj kulturkonferencoj.

4. Sekcio jura. Gvidanto de la kunveno: D-ro Orihal (anstataŭanto de s-o Litauer). Raportoj ktp.
5. Sekcio kemifizika. Gvidanto de la kunveno: S-o Studokonsilisto Dühring. Raportoj ktp.
6. Sekcio biologia. Gvidanto de la kunveno: D-ro Döhler (anstataŭanto de D-ro van Emden). Raporto ktp. Detala diskuto pri la tezoj pri enkonduko de Esperanto en la Biontologio (komp. Int. Scienca Revuo, kajeroj 7—9).

Internacia Scienca Asocio
Dr. Döhler

Zittau en Saksujo.

(Laŭsitz'a Esperanto - Semajno: 2.-9. Septembro 1923).

Post la kongreso la partoprenintoj disiros en plej diversajn direktojn kaj estas certe, ke ĝuste la okazado de Universala Kongreso en Germanujo estas favora al vizito al la foirujo de Leipzig kaj Reichenberg. Kiu vizitas ambaŭ forojn aŭ almenaŭ tiun de Reichenberg ne povas eviti ius la belan orientaksan urbon Zittau, la ĉefurbon de la saksa „Laŭsitz“ kies moniaro salutas la vojaĝantojn jam de malproksime. Estas vera peko se oni preterlasas la viziton de tiu ĉi perlo en la krono de la saksaj urboj. Multaj, kiaj jam aŭdis pri Zittau, diros: „Ĉu Zittau, kiun mi konsas kiel industri-lokon, povas esti vidinda?“ Efektive oni laŭŝajne gustu pensas: ĉar Zittau vere estas grava loko de plej diversaj industri-branĉoj kun multaj grandaj teksejoj, spinejoj, ferfabrikejoj ktp; sed tamen oni konvinkigis, kiam oni venos al Zittau, ke la riĉeco je fabrikejoj neniel ĝenas la karakteron de ĝarden-urbo, kiel kiu Zittau ankaŭ estas vaste konata. Kiu elrigardas la ĉefstacidomon kaj ĝuas la harmonian aspekton de la multa verdo superŝutita de multkoloraj floroj kaj kadrumata unuflanke de belaj vilaoj kaj hoteloj kaj aliflanke de la moderna akcia societo ĉe la „Phänomen“-aŭtomobiloj kaj bicikloj, post kiu salutas la bela moniaro, iu certe iuj diras: „Ĉi tie mi restos“, se li eĉ povus prokrasti sian vojaĝon nur duonan tagon. Por ke li ne estu sola, la Esperantistaro de Zittau pendigis en la elirejon tabulon kun Esperantistaj adresoj, kiujn oni povas alvoki per la publika telefono, kiu troviĝas en la stacidomo. Kaj la diligenta kolegaro de Zittau estas volonte preta agrabligi al la vizitanto la esperinde ne mallongan tempon de lia restado.

„Nu, mi jam vidis multajn urbojn kun belaj domoj, belegaj promenadoj, antikvaj preĝejoj, kaj kion la artikolo en ET n-o 141 plue mencias. Kion novan Zittau povas ankoraŭ montri al mi krom eble la florhorligo?“ — Do bone, se vi jam ĉirkaŭvojaĝis la tutan mondon, la urbo mem eble ne plu efikos tiom je vi, kion je aliaj. Sed ĉu vi jam vidis ion, kio similas al la belega ĉirkaŭejo? Estu nomataj kelkaj nomoj, kiu hazardo fluas el la fontplumo. Jen estas la aer-kurac-lokoj, montaj kaj vintra sport-lokoj Oybin, Jonsdorf, Lückendorf, la mar-banloko Oppelsdorf, la Neisse-valo, la ĉefaj montoj de la Zittau-a moniaro Hochwald, Lausche, Töpfer, Oybin. Cetere, kion en iu montero samspeca kiel la Zittau-a oni povas ankoraŭ kompari kun la Oybin-monto? Jam estante natura strangajo pro sia formo, ĝi estas ankoraŭ pli belega per la restejo de malnova kavalaro kaj imperiestra kastelo kaj monaĥejo. La majestaj ruinoj, la surmonta tombejo, la lageto en la abismo, la romantike kuŝanta arbara teatrojo kaj la idilia vilaĝo faras unikan impreson, kiu neniam plu estas forgesebla. Multe vojaĝintaj famuloj jam konfesis tion. Ekzemple la germana grafo Molke skribis: „Tio estas la plej bela, kion mi vidis dum miaj vojaĝoj. La germana imperiestro Frederiko IIIa nomis la Oybin-monton „miraklo de Dio.“

Kelkfoje okazas iluminacio de la ruinoj kaj kantista societo de Zittau prezentas monaĥan aron, kiu kvazaŭ reviviginte venas de sur la mont-pinto, kantante monaĥajn kantojn, kaj tra la romantika klaŭstro ires en la preĝejan ruinojn. Tiu ĉi spektaklo postlasas al la rigardinto neniam plu forigeblan profundan impreson.

„La artikolo ne estu tro longa!“ pensos sinjoro redaktoro. Tial sufiĉu nur mallongaj mencioj de aliaj vidindaĵoj. Al la moniaro de Zittau aligas la okcidenta fino de la Sudetoj, la Iser-montaro, la montaro de Reichenberg, norde de Zittau kuŝas la Monta Lando de la „Laŭsitz“. En la proksimaĵo estas ankaŭ la urboj Görlitz kaj Bautzen (la „Saksa Nürnberg“). La situacio de Zittau (ĝi distancas nur tri kilometrojn de la ĉeĥoslovaka limo) estas ankaŭ favora al vizito al la Nordbohema Monta Lando. Kaj ĉiuj ekskursoj estas entreprenblaj moforte per mallonga fervoja veturado dum unu tago. Ila riĉeco ne estas priskribebla, oni venu kaj admiru mem.

Bonega okazo por ĝui tiujn ĉi miraklojn de la naturo inter multaj gesamideanoj prezentas la Laŭsitz'a Esperanto-Semajno, kies provizora programo jam parte aperis en ET n-o 141 kaj intertempe pligrandigis tene: 2. Septembro: Siataj ekzamenoj (Vidu „Germana Esperantisto“ Juni-numero).

5. „Lumbildprezentado kaj parolado de s-o. W. J. Drummond el Melbourne pri „Aŭstralio“. Ekskurso el Oybin. Vizito al la arbara teatrojo, al vidindaj ŝtono-formacioj kaj suprenirado sur la monton. Rigardado de la ruinoj. Ĉe komencigo de la nokto (ĉe sufiĉe multnombra rigardantaro) iluminacio de la ruinoj kaj monaĥar-irejo.
9. „Rigardado kaj gvidado tra la urbo. Komuna fotografado.

Krome okazos dum la semajno diversaj laŭvolaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon.

Interesatoj bonvolaj aĉeti gvidlibron „Zittau kaj ĝia montero“ en la kongresa libro-vendejo. La subskribinta grupo estas volonte preta por pluaj informoj.
Saluton kaj koregan bonvenon!

Societo „Esperanto“, Zittau.
(Sufiĉa adreso.)

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur posikarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Landoj.

Aŭstralio.

La 21. majo la Esperanto-Klubo de Melbourne entuziasme adiaŭis s-on Drummond, forveturinte Eŭropon, kiel delegito por la XV-a.

Italujo.

Mantova. La 5. julio la Mantua Esp. Grupo inaŭguris sian propran novan side-on en Strato XX Settembre, 16. Antaŭ kvardeko da invititoj parolis la delegito de Itala Esp. Federacio pri Esperantismo kaj UEA. La sidejo estas malfermita ĉiŭespere kaj oni invitas Esperantistojn travojaĝantajn Mantova viziti ĝin.

Japanujo.

Tokio. Aligrada kurso ĉe Nippon-Esp.-Sa bone progresas sub la gvido de s-oj Ossaka, Ĉih kaj aliaj sinjoroj. Pli ol dudek fervoraj Esperantistoj kunvenas ĉiŝabate. La 11-a de aprilo bonveniga kunveno por fratindro Root, samideana ĵurnalistino el Ŭsono, estis arangita ĉe „Gakusikai.“ Kelkdek ĝeesperantistoj kunvenis por vidi tiun ĉi mondfaman pacifistinojn. La 26-an de aprilo propaganda kunveno okazis en la Unua Nacia Kolegio. S-o Junker elokvente paroladis germane. D-ro Murata kaj s-oj Inoue kaj Hori ankaŭ paroladis. Vespere „Kompa“ estis arangita en mangoĉambro kun ĉeesto de Ossaka.

Jokohama. La 24. marto, Jokohamaj samideanoj adiaŭis D-ran Ramstedt. Verda standardo fliris en frumaterna vento preĝante bonvojaĝon por nia intima amiko. Kioto. La 18. marto la unua kunsido de studentaro en nova lernejsesono okazis sub la prezido de s-oj Sakurada. Regularoj de ĉiuj grupoj estis deciditaj. La 22. marto fino Alexander vizitis tiun ĉi urbon kaj bonveniga kunveno estis arangita en la kunsedejo de Univ. Ŝia ĉarma parolado pri Bahaismo tre interesiĝis ĉeestantojn.

Nagoja. Studena Federacio bone funkcias sub gvido de s-oj Ŭguro. Nova kurso en la Teknika Kolegio akiris ĉirkaŭ 50 ĉeestantojn. Kurso sub aŭspicio de ĵurnalo Sinaĉi ankaŭ sukcesis sub gvido de s-oj Ŭguro. En la Oka Nacia Kolegio ankaŭ nova kurso komencigis kun 40 studentoj. La 26. aprilo kunveno de ĉeestintoj de la kurso okazis kaj novaj samideanoj ankore esprimis dankon al la gvidinto. Kelkaj famaj magazenoj komencis uzi nian lingvon por reklamo aŭ en montra fenestrejo.

Onomiĉi. Nova esperanta klubo fondiĝis en tiu urbo dank' al klopodo de s-o Naka.

Saseho. S-o Aŭaja, nova centro de nia movado en tiu ĉi urbo gvidas kursojn por maroficistoj kun 50 ĉeestantoj.

Jaŭata. S-o Curuga fervore propagandis dum ĵia reveno al hejmlando. Li gvidis kursojn ĉe Kokura kaj Jaŭata kun 150 ĉeestantoj. Tiel nova Esperanta grupo estas naskiginta ankaŭ en tiu ĉi parto de Kjusiu.

Asakura. Nova grupo naskiĝis en la Asakura Liceo. S-o Hori fervore arangis kaj gvidis. Ni tre ĝojas, ke liceanoj tiel fariĝas centro de kultura movado inter lokaj junuloj.

Koreo.

Sŭul (Keijo). Dank' al penado de s-o Mijamoto kurso malfermiĝis en la Korea Banko kaj nova grupo naskiĝis en tiu ĉi banko.

Hejjo. Brava batalanto s-o Ojama vojaĝis ĉi tien kaj paroladis en liceo kaj aliaj lernejoj kaj por publiko. Poste li kaj s-o Nakagaki gvidis kursojn en Kioto Virina Liceo sub aŭspicio de ĵurnalo Heinan-Mainiĉi. Okdek ĉeestantoj kun D-ro Uemura kaj in-kuistoj fervore aŭskultis lin; ni devas grandilte reporti klopodon de s-o Ojama kaj s-o Mori, ĵurnalistoj.

Jinsen. Esperanta kurso okazis en popola lernejo sub gvido de s-oj Ojama kaj Makagaki kun granda sukceso. Nova grupo naskiĝis.

Nederlando.

En Dordrecht oni starigis Esp. Klubon kun komence 17 anoj. Gvidanto: s-o B. P. Roubos.

Kunveno de la Nederlanda Unuiĝo Esperantista

„La Estonto estas Nia.“
Dimanĉon, la 8-an de julio kunvenis la Nederlanda Unuiĝo Esperantista „La Estonto estas Nia“ en Utrecht. Je la 10^{1/2} h. matene la prezidanto, s-o Isbrücker malfermis en hotojo „L'Europe“ la kunvenon kaj dediĉis kelkajn vortojn al nia morlanta Harlema pioniro, s-o Sevenhuisen, prezidanto de la Harlema grupo, senlaca batalanto por Esperanto tiel por la nacia, kiel por la internacia movado inter la instruistoj, kies samprofesiajn li estis.

La grupoj raportis pri sia agado en la lasta duonjaro laŭ tiuj raportoj oni povis konstati, ke la diversaj grupoj ankoraŭ faras multe da penoj por disvastiĝi Esperanton.

La protokolo de lasta kunveno estis legita kaj aprobita. Kiel delegito al la XV-a en Nürnberg estis elektita s-o Isbrücker; vicedelegitoj la s-oj Rutgers, v. Timmeren kaj Donker.

Pri ET la ĉefstarano komunikis, ke ĝi penos trovi en ĉiu loko, kie estas Esperantistoj varbanton por tiu gazeto, por ke kiel eble plej baldaŭ ni atingu la nombron necesan, por ke la abonprezo plimaliĝu.

La vintra kunveno estos la 20. januaro 1924 en Amsterdam.

Fermo de la laborkunsido je la 12^{1/4} h. Poste ĝis 1^{1/2} h. komuna lunĉo en sama hotojo.

Je ĝusta tempo alvenis rezervita elektra tramo, per kiu la partoprenantoj veturis al la nova parko „Oog inal“; tie estis por la partoprenantoj rezervita loko, kie ili kantis kaj gaje babilis dum la ĝuis belan vidaĵon.

Poste vizito per la sama tramo al rozarejo en Wilhelm-parko. La rozoj estis en sia plena florado. De tie oni promenis tra diversaj parkoj al la hotelo, kie oni alvenis je la 6 h. por komuna tagmanĝo.

Je la 7^h h. komencis la vesperfestoj aranĝita de la loka grupo. La gajaj mienoj kaj la aplaŭdoj pruvis, ke la vizitantoj (195, inter kiuj estis 120 neesperantistoj) estis kontentaj. Interligite al la fermo s-o Justus Tal faris pagandan paroladon por la neesperantistoj. Li riparolis la facilecon de Esperanto, nome Esperanton la rimedon por komprenado kaj fratecon inter la nacioj. Post 60 jaroj niaj nepoj ridos pri siaj nuntempaj avoj pro tio, ke ili ne uzis ankoraŭ la fidelan Esperanton. La amika adiaŭdo de la foririntoj pruvis, ke la vespero bonege sukcedis. La kvar lokaj gazetoj raportis la postan tagon tre favore kaj finis la raportojn per la vortoj: estis agrabla kaj bon-sukcesinta vespero.

Rumanujo.

III-a Rumana Esperanto-Kongreso. (Timiŝoara, 27.-30. julio.)

La rumana kronprinco kaj du ministroj protektas. La tria landa kongreso de la rumana Esperantistaro baldaŭ okazos en Timiŝoara, la historia urbo, fama kiel moderna grandurbo kun alte evoluinta industrio kaj kultura centro. La kongreso havas kiel patronon lian moŝton Carol, kronprinco de Rumanio, protektantojn en la personoj de ministroj, s-o D-ro C. Angelescu (publ. instruado) kaj s-o Const. Banu (kultoj kaj artoj), kiel honoran prezidanton, s-on generalon C. Gavanescu, komandanto de l' divizio Banata.

Partoprenantoj ĝuos 75% rabaŭton sur la rumana ŝtata kaj ŝtate administrata fervojaroj. Rumanaj gesamideanoj estas alvokataj por grandnombre ĉeesti, eksterlandanoj estas kore invitataj por ĉeesti kiel gastoj. Post la kongreso el Timiŝoara forveturos la rumana karavano al la XV-a en Nürnberg. Aligilojn kaj informojn oni petu de la prezidanto de la Organiza Komitato, s-o D-ro Jozefo Németh, advokato, IV, Bulevardul Carol 15.

Rusujo.

Barnaul, 1.7. Barnaula Esperantista Grupo dum semajno 12.-18. februaro aranĝis ekspozicion en Centra urba biblioteko. Estis elmetitaj diagramoj pri Esperanta movado, eldonadoj de Barnaula Societo, broŝuroj, ilustritaj poŝtkartoj, diversaj Esperantaj libroj kaj ĵurnaloj novaj kaj malnovaj, el Esperanta biblioteko. Ankaŭ estis elmetitaj sub devizo: „Esperanto estas pordo en ĉiujn landojn“ 180 plej karakterizaj ilustritaj poŝtkartoj, ricevitaĵi per Esperanto de fama propagandisto Serŝev.

Dum malfermo de ekspozicio s-o Kazansky faris raporton pri konstrueco, signifo kaj interrilatoj per Esperanto, Petrov — pri instruista kongreso en Genevo.

18. marto Kazansky raportis pri Esperanto en duagrada lernejo por plenanuloj.

Dum aprilo la grupo eldonis 1500 ilustritajn poŝtkartojn, 10 diversajn specimenojn kun Altajaj vidaĵoj. Ili estas vendeblaj por 2 oraj kopoj po ekzemplero.

En kvar grupoj de lernejo de III. Internacia devige estis instruata Esp. Du grupoj jam finis gramatikajn kaj du baldaŭ finos. Kursanoj organizis rondeton, kiu eldonas Esp. kursan gazeton „Verda Stelo inter ruĝaj flagoj“. Por interesi ĉiujn lernantojn la gazeto estas elpendigita sur la plej vidata loko.

Grupo havis interrilatojn kun apudaj vilaĝoj Partovsk de Barnaulo Uezdo, kie ankaŭ en lernejo de III. Internacia la direktoro Ivanovsky instruas Esperanton. Komencis kurson 60 lernantoj; nun lernas 55, el kiuj 10 donas esperon fariĝi bonaj Esperantistoj. Mankas lerniloj. Sivecka de Biskaja Uezdo (regiono) lernanta rondeto sub gvido de instruisto Lazareviĉ-Ignatiev. Sjaro-Bardinskoje de Byska Uezdo (loko estas fama per tio, ke ĝi estas unika vilaĝo en tuta Rusujo, kie estas elektra lumado en ĉiuj kabanetoj) rondeto de kultur-kleria s-o sub gvidado de Timo Feer. Ĉiuj deziras korespondi.

Grupo estas ano de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo kaj S.A.T. ricevas bultenojn de S.E.U. kaj Sennaciecan Revuon de 7-8 N. ankaŭ Esperanton Triumfontan kaj abonis Novan Epokon. A. Petrov, prezidanto.

Varbu komercajn anoncojn por „Esperanto Triumfonta“.

Socia Vivo.

Ĝeneralaj principoj pri organizo de laborinspektado.

